★

# Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

## La 72-a kongreso de KELI

**Preparas:** Oldřich Arnošt Fischer

Jam longtempe mi revis pri vizito de Bjalistoko, pola urbo, en kiu ekestis esperanto. En tiu ĉi jaro (5 – 12 aŭgusto 2023) tie okazis la 72-a kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI). Kongresejo situis en Ĉefepiskopa Supera Pastra Seminario. En la kongreso partoprenis ĉirkaŭ 60 esperantistoj el 10 eŭropaj landoj. Temo de la kongreso estis „Dialogo inter religioj". Ni renkontiĝis kun ortodoksaj kristanoj, judoj kaj islamanoj (polaj tataroj), povis admiri belan naturon de nordorienta Pollando, vidis lokon, kiuj rilatas al vivo de Ludoviko Lazaro Zamenhof, manĝis tataran manĝaĵon (pilafon), vizitis sinagogon, ortodoksan monaĥeon. moskeojn kaj tataran tombejon. Mian atenton kaptis precipe rakonto pri malnovritanoj, ortodoksaj kristanoj, kiuj en Pollando trovis sian rifuĝejon. Dum jarkunveno de KELI ni jam planis la 73-an kongreson, kiu okazos en hungara urbo Vác (3 – 10 aŭgusto 2024).

Ĉeesta programo, ĝi estas registrota.
**Lingvo:** Esperanto

**Kiam:** la 27-an de septembro 2023 je la 18-a h. (La klubejo estos malfermita ekde 17.45)

**Kie:** Občanský klub, **Hybešova 65a**, Brno. La klubejo ne estas en ĉefa parto de strato Hybeŝova, sed en mallonga sakstrato. Rigardu la mapon. La plej proksima tramhaltejo estas Václavká (linioj 1 kaj 2 el ĉefa stacidomo)

★

## Ni rekomendas

- La 28an de septembro — 1an de oktobro **Konferenco de Ĉeĥa Esperanta-Asocio**, Prudká (apud Tišnov, Ĉeĥio)
- La 13an — 15an de oktobro, **BIERO**, Strakonice
- La 3an — 10 de aŭgusto 2024 **Universala kongreso**, Aruŝa, Tanzanio. La plej favora prezo nur ĝis jarfino.
- Aperis interesa libro pri propedeutika valoro de Esperanto. Alessandra Madella: ***Esperanto: facile lernebla kaj helpo en la studo de aliaj lingvoj*.** Se hazarde kolektiĝos almenaŭ dek ĉeĥoj, eble ni povus mendi kune kaj ŝpari. (Noto: mi jam havas la libron, tial mi havas nenian personan intereson ricevi rabato.)

★

## Programo en oktobro

La 4-an **Kion ni legas** – Milan Kolka, rete per Skajpo
La 11-an **Vikivojaĝo** – Václav Zouzalík, Klubejo Hybešova 65a, Brno
La 18-an **Spirita literaturo ĉe KAVA-PECH** – Petr Chrdle, rete per Zoom, komuna renkotiĝo kun klubo Glivice
La 25-an *Ankoraŭ ne agordita*, Klubejo Hybešova 65a, Brno

## Programo en novembro

La 1-an *Ankoraŭ ne agordita* , rete per Skajpo

La 8-an **Kaktoj - pikantaj beluloj** – Oldřich Arnošt Fischer, Klubejo Hybešova 65a, Brno
La 15-an **Aruŝa 2024** – John Magessa, rete per Zoom, komuna renkotiĝo kun klubo Glivice
La 22-an *Ankoraŭ ne agordita*, Klubejo Hybešova

★

Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (https://www.esperantobrno.cz/index.php/eo/aprogramo),
- na naší stránce na Facebooku (https://www.facebook.com/esperantobrno/)
- a na Eventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brno)

Nahrávky proběhlých přednášek a některých dalších programů naleznete na našem kanálu na Youtube (https://www.youtube.com/@esperantobrno).

Milan Kolka
prezidanto

(Noto: bonvolu ne uzi retpoŝtadreson invitiloj@esperantobrno.cz por respondoj, ĉar ĝi funkcias kiel nigra turo. Se vi sendus ion ajn al ĝi, la mesaĝo atingus nenies retpoŝtkeston.)

**Od**